

# La Riverego

Prezidanta raporto	2	ARE 25-jara	19
Ĝisdatigo pri la 105-a UK	5	Volontulu por la UK !	23
Renkontu Suzanon la duan !	9	Esperanto kaj LangFest	24
Raporto de la 103-a UK	13	Ido : la malamiko ?	29
Sukcesega komuna kongreso	17	El Paralela Universo	36



# Prezidanta raporto por 2017–2018

*Nicolas Viau*

*Lors de l'Assemblée annuelle de la SQE le 14 septembre, Nicolas Viau a fait un retour sur les activités de l'année écoulée, qui fut pleine d'action, notamment dans la perspective du Mondial d'espéranto à Montréal en 2020. Rappels des événements et nouveautés qui ont rythmé une année réussie !*

## Kunvenoj

Multaj partoprenantoj en Montrealaj kunvenoj !

- Novaj kunvenoj : paroligaj rondoj de Suzano Roy en La Récréation, apud Végo.
- Estas nun regulaj kunvenoj en Kebekurbo, ankaŭ danke al Suzano Roy.
- La Jarfina Festo sukcesa, en itala restoracio (danke al la serĉoj – kaj trovo ! – de Normando Fleury).
- Sukcesa Mekaro en Tririvero (denove dankon al Suzano Roy) !
- Okazis unuafoje en Montrealo KER-



ekzamenoj (dankon al Suzano Roy, Riano Callahan, Ĵenja Amis).

- Paralela Universo estis okazigita kaj altiris entute 13 esperantistojn, danke al la streboj de Garry Evans.
- ARE – pri kies organizado ESK kunlaboras – daŭre viglas, kaj ĝia lasta okazigo estis bona momento por paroli pri la UK en Montrealo, pri

kiu multaj usonanoj kunlaboros.

## Societaj komunikiloj

Plibonigo de la societa retejo (bildŝovilo, aliĝilo, novaĵoj, ĝenerala ĝisdatigo).

- Ciferigo kaj disponigo de 15 numeroj de *L' Alvoko*, kluba gazeto en Kebekurbo en la 60-aj jaroj (danke al la personaj arkivoj de

Jakobo Gaucher).

- Daŭra uzo de Meetup. Kreado de Meetup-grupo por Kebekurbo.
- Daŭra – kaj espereble efika – uzo de Facebook por anonci kunvenojn.
- Sendado de la *RiveReto* kun nova modernigita aspekto (dank' al Silvano Auclair).
- Belegaj kaj enhavplenaj numeroj de *La Riverego* (Ĵenja) kun gravaj artikoloj pri Montrealo kaj la UK... Ni provu jam allogi la tutan mondan esperantistaron al nia urbo !
- Ni represis informilojn (kiuj nun informas nun ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri la UK !).

## Amaskomunikiloj

Esperanto aperis plurfoje en lokaj medioj.

- Radia intervjuo de Nicolas Viau ĉe CISM 89,3 FM – radio de Universitato de Montrealo – dum elsendo pri planlingvoj.
- Radia intervjuo de Suzano Roy kun Radio-Canada en Tririvero dum MeKaro.
- Videa raporto de la reta gazeto TABLOÏD dum Paralela Universo.



## Eldonado de libroj

- Ni reeldonos la librojn *Bestoj en nia domo* kaj *Birdoj en nia korto*, sub la direkto de Zdravka Metz
- Ni planas reeldoni libron pri la Historio de la movado en Kebekio (plej verŝajne ĝisdatigita versio de la libro pri la 30-jariĝo de ESK).

## Esperanto en Montrealo

Aldoniĝu ankaŭ kelkaj vortoj pri Esperanto en Montrealo...

## LangFest – Montreala Lingva Festivalo

Okazis jam triafoje LangFest. Budo estis starigita kun apogo de Kanada Esperanto-Asocio kaj

Esperantic Studies Foundation. Multaj homoj scivolemis pri nia lingvo tie ! Oni aperigis anoncon en la kongresa libreto. Dankon al Ĵenja, Joel, Garry pro ilia afabla helpo !

- Ĉeestis pluraj Esperantistoj – lokaj kaj nelokaj !
- La fama esperantisto Chuck Smith prelegis pri planlingvoj kaj faris enkondukan atelieron pri Esperanto por komencantoj. Plie, *Amikumu* estis sponsoro de la evento.
- Nicolas Viau, kiu kunorganizis la eventon, ankaŭ prelegis pri lingvo kaj povo (« Langues et rapports de force ») – tre Esperanteca temo.
- Oni parolis pri aliaj tiaj « Esperantecaj temoj » : ekzemple la statuso de la diversaj lingvoj de la mondo, malplimultaj lingvoj... Estis multaj enkondukaj lecionoj al lingvoj...

### **Universala Kongreso 2020 en Montrealo**

- Eblas, ke oni partneru kun LangFest en 2020 por altiri al la UK partoprenantojn de

LangFest, kaj reciproke.

- Oni faris tre efikan reklaman kampanjon ekde la anonco antaŭ jaro, kaj la prepara laboro jam antaŭeniras :



- la Unua Bulteno estis preparita kaj presita jam unu jaron antaŭ la normala dato,
- oni starigis budon dum la UK en Lisbono,
- la kongresa logotipo jam pretas,
- la Facebook-paĝo estas jam vaste diskonigita kaj « ŝatata ».
- Baldaŭ pretos aparta retejo pri la Kongreso.
- Montrealo do estas grava centro pri lingvoj ĝis almenaŭ 2020 !

### **Dankoj**

Ĉiuj ESK-anoj kaj geamikoj de Esperanto en Kebekio, Kanado kaj Nordameriko do estu dankegitaj ! Ĉiuj gravas por sukcesigi ĉiujn ĉi projektojn !

# UK-2020 en Montrealo : bela progreso !

## *Ĵenja Amis*

Karaj amikoj,

Ni ŝatus kun fiero informi vin, ke la preparlaboroj por la Universala Kongreso de 2020 en Montrealo bone progresas ! La kongreso okazos en hotelo Sheraton (urbocentre), de la 1a ĝis la 8-a de aŭgusto 2020. Jen la resumo de niaj agadoj kaj, kompreneble, la invito kunlabori !

**Ni havas emblemon !** Ĝia aŭtoro estas Francisco Luis Veuthey (Argentino / Nederlando), profesia grafikisto, kiu dum longa tempo laboris ĉe UEA kaj estas la aŭtoro de multaj antaŭaj logotipoj de la pasintaj UK-oj. Ni estas tre dankemaj al Francisco pro lia helpo !

La koloroj de la logotipo estas **ruĝa, blua kaj verda**. Oni povas libere interpreti la signifojn, aŭ oni povas ankaŭ pensi pri la verdo de Esperanto kaj de la naturo, la ruĝo de Kanado kaj de la suno (ja en pluraj kulturoj la suno estas ruĝa !), kaj la

bluo de Kebekio aŭ de riveroj kaj maroj. En la emblemo oni vidas ankaŭ la monton, la Reĝan Monton (france Mont Royal), kiu donis sian nomon al la urbo, kaj la riveron Sankta-Laŭrenco, kun la ponto Jacques-Cartier (oni povas ankaŭ pensi, kompreneble, pri Esperanto kiel ponto inter lingvoj kaj kulturoj).



**Ni aperigis la Unuan Bultenon !** La Unua Bulteno estas la unua informilo pri la UK, kiu kutime aperas unu jaron antaŭ la kongreso. Esceptokaze, ni produktis ĝin *du* jarojn antaŭe, por bone antaŭeniri kaj frue reklami la eventon. Vi povas elŝuti la Unuan Bultenon [ĉi tie](#).

**Ni multe reklamis la UK-on 2020 dum la UK-2018 en Lisbono !** Ni havis tablon kun broŝuroj kaj aliaj materialoj. Ni ankaŭ montris videon pri Montrealo dum la programero dediĉita al la venontaj kongresoj, faris prezentaĵon kaj eĉ



## Spektu videeton pri Montrealo (maldekstre) kaj landajn salutojn dum la 103-a UK en Lisbono

disdonis acerbombonojn fine de la programero (oni multe aprezis tion!). Vidu la videeton pri Montrealo [ĉi tie](#). Eblas ankaŭ spekti la landajn salutojn (inkluzive de nia!) [ĉi tie](#), kaj aŭskulti la intervjuon kun Joel kaj mi ĉe la Pola Retradio [ĉi tie](#). Kompreneble, venontjare, en Lahtio, ni reklamos eĉ pli multe! 😊

**Ni kreis informilojn pri Esperanto kaj la UK**, dank' al la subteno de KEA! Estas tre belaj vizitkartograndaj faldeblaj informiletoj en la franca kaj en la angla kun la enkonduka lecioneto pri Esperanto kaj la kontaktinformoj kun KEA, ESK kaj Esperanto-USA. (Kanadanoj rajtas ricevi la informiletojn senpage, simple petante ilin de KEA aŭ ESK; Esperanto-USA prizorgas la presadon de

la informileto en Usono.)

**Ni sukcese reklamis Esperanton kaj la UK-on dum LangFest en Montrealo!** LangFest estas jam tradicia nordamerika aranĝo por lingvemuloj (legu pli pri ĝi pli poste en tiu ĉi numero). Dank' al subteno de ESF kaj KEA, ni havis belan Esperantobudon, tutpaĝan reklamon pri la UK en la programo, kaj, kompreneble, ni disdonis la informilojn, parolis al eble centoj da homoj, kaj okazis Esperanto-ateliero (fare de Chuck Smith). Ni ankaŭ konatiĝis kun multaj Esperantistoj, kiuj lernis la lingvon per Duolingo aŭ alimaniere, sed neniam partoprenis Esperanto-aktivaĵojn ĉeeste — ĉiuj promesis veni por la UK! 😊

2019 kaj 2020 estos ege gravaj kaj laborpostulaj

por la LKK kaj ĉiuj helpantoj. Ni devos daŭre multe reklami la eventon, larĝigi la teamon kaj varbi volontulojn, trovi respondeculojn pri kelkaj gravaj postenoj, ellabori ekskursojn kaj antaŭ- kaj postkongresajn, krei serion de prelegoj pri Kanado / Kebekio / Montrealo, trovi partnerojn kaj sponsorojn (financajn, kulturajn, organizajn, ktp.), kaj multege kunlabori kun UEA kaj nia najbara asocio, Esperanto-USA, kies kelkaj membroj estos en la UK-teamo. Ni ankaŭ esperas ke Usono havos specialan lokon en la programo (koncertoj, prelegoj, ktp).

Ni ankaŭ kolektas, pere de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA), kontribuojn de esperantistoj por subteni la UK-on en Montrealo. La sumo, kiun ni kolektos, kovros la kostojn, kiujn ne kovras UEA : ekzemple, diversajn eventojn ĉirkaŭ la UK, aldonan reklamadon de la UK en la urbo mem (ekz., eksteran reklamadon : banderolojn, flagojn, ktp ; reklamon en Facebook, ktp). La kolektita mono povas esti uzata ankaŭ por finance helpi al gejunuloj aŭ nepagipovaj homoj partopreni. Ĉiu mono donacita al KEA por la UK estos transdonita al la LKK. Donacu rete per [www.canadahelps.org/](http://www.canadahelps.org/)



105-a Universala Kongreso de Esperanto  
Montrealo, 1 – 8 aŭgusto 2020



#### Unua Bulteno



[en/charities/kanada-esperanto-asocio](http://en/charities/kanada-esperanto-asocio) (angle) aŭ [www.canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/](http://www.canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/) (france) aŭ per ĉeko en kanadaj dolaroj al la kasisto de KEA, Raymond Brisebois : 414–110 Grand Avenue, London ON N6C 1L8. Bv. indiki la celon de via donaco : UK-2020.

Por sukcesigi la kongreson ni bezonos multajn volontulojn, kaj ni havos taskon por ĉiuj, kiuj pretas helpi. Ekzemple, necesos homoj, kiuj pretas gvidi ekskursojn, traduki, registri kongresanojn, helpi bonvenigi la gastojn el la tuta mondo. Tio estas granda laboro, sed laboro ege ĝuinda kaj persone riĉiga sperto. Ni speciale invitas esperantistojn el Kebekio, kaj ĉie en Kanado, pensi pri prezentaĵoj kaj kontribuoj al la programo, aparte rilataj al la kulturoj kaj historio de nia lando. Se vi ŝatus volontuli, bv. plenigi la jenan formularon (vi ankaŭ povas sendi ĝin al viaj amikoj kaj konatoj) : [tiny.cc/volontuloj2020](http://tiny.cc/volontuloj2020). Ni ankaŭ bonvenigas viajn ideojn kaj proponojn pri la programeroj.

Dankegon pro via helpo kaj subteno !

## UK-2020 : Malkovru niajn kulturojn !

Renkontu Suzanon Roy, aŭ Suzanon la duan ! Suzano la dua estas estrarano de ESK kaj plej lastatempe respondeculino pri la ekskursoj antaŭ-, dum- kaj postkongresaj por la montreala UK okazonta en 2020. Ŝi estas tre aktiva en nia laboro kun novuloj : ŝi gvidas la konversaciajn rondojn por komencantoj en Montrealo, kaj ankaŭ reaktivigis la Esperanto-grupon en Kebekurbo, kie ankaŭ estas konversacia rondo. Krome, Suzano organizis jam du Mez-Kanadajn-Renkontiĝojn de Esperanto (MeKaRojn) en la urbo Trivero, kie ŝi loĝas (lastan fojon, ĉi-jare).

**Gratulon kaj dankon pro via eniro en la UK-teamon kiel respondeculo pri ekskursoj (grandega tasko !), kaj ankaŭ gratulojn pro via lastatempa emeritiĝo ! Rakontu pri vi mem iomete ! Kial via Esperanta nomo estas Suzano la dua ?** 😊

– Mi adoptis tiun nomon, kiam mi ekpartoprenis renkontiĝojn en Montrealo, antaŭ dek jaroj. Mi gardas ĝin, omaĝe al Suzano la unua (Bolduc), kiu jam delonge estas konata en la Movado (kaj nun bona amikino).

**Kiel vi esperantistiĝis ?**

– Bedaŭrinde, mi sciis nenion pri Esperanto ĝis konversacio kun amiko en Trivero, kiu menciis, ke li iam partoprenis « Esperanto-Kongreson ».

Tio surprizis min, kaj mi tuj petis informojn. Li pruntedonis al mi kelkajn librojn. Dum feria semajno, mi tralegis la tuton kaj tio vere mirigis min. Je ĉiu paĝo, mi pensis : « Genia ! Estas genia afero... » Tuj dekomence, mi decidis, ke mi volas disvastigi tiun mirindan lingvon.

**Kiel vi uzas Esperanton persone ? Ĉu vi multe uzas ĝin dum vojaĝoj ?**

– Uzo de Esperanto vere ŝanĝis mian vivon, pro tute nova amikaro kaj ankaŭ pro tute nova maniero vojaĝi. Mi nur ege bedaŭras, ke mi malkovris ĝin tiom malfrue, kiam mi estis jam 50-jara. De la aĝo de 20, mi ĉiam vojaĝis kaj provis lerni la lingvon de la lando, kiun mi vizitas. Sed estis ege frustre, ĉar oni tre malfacile, per



longdaŭra peno, atingas ne vere fluan nivelon, do konversacio estas limigita... Kiel multe aliaj, « Mi longe penis... por lerni la germanan ! » 😊 Nun, uzante Esperanton, mi sentas min libera : mi povas vere komunikiĝi dum miaj vojaĝoj. Kaj mi havas amikojn en multaj landoj. Per nuntempaj senpagaj komunikiloj, mi parolas al diversaj homoj ĉiutage.

**Kiu venas kaj kio okazas dum la konversaciaj rondoj por novaj esperantistoj en Montrealo kaj Kebekurbo ? Al kiu vi rekomendus partopreni en tiaj rondoj ?**

Komence, mi pensis ke mi povus instrui la lingvon. Sed la unua problemo ne estas instruado : estas simple, ke kebekianoj eĉ ne scias, ke Esperanto ekzistas kaj utilas. Do, disvastigo de tiu simpla informo gravegas. ESK ankoraŭ havas multon por fari, tial mi aktive partoprenas. Poste, mi komprenis ke « instruado » (jes, mi provis) ne estas taŭga solvo. Oni ne lernas lingvon pasive. Neniu instruisto povas fari vin fluparolanto en iu ajn lingvo. Vi devas studi memstare, regule... Kaj, post kiam vi lernis ion, vi devas praktiki ĝin. Tiam



mi povas helpi. Mi ege ĝojas, kiam mi babilas (simple, malrapide, sed tamen efike !) kun komencantoj aŭ progresantoj, kaj kiam ili mem vidas, ke tio, kion ili studis, ja utilas. Funkcias. Jesss ! Kuraĝiga sperto. Mi neniam uzas la francan aŭ la anglan dum tiuj « diskutrondoj ». Ĉiuj, kiuj

ne posedas tre altan nivelon de la lingvo, povas profiti de tiaj renkontiĝoj ; kaj ankaŭ mi lernas !

**Vi organizis MeKaRojn en Tririvero jam dufoje.**

**Kompreneble, ne eblas kompari la malgrandajn renkontiĝojn, kiel MeKaRo aŭ ARE, al UK, sed tamen ĉu vi pensas, ke io el viaj MeKaRaj spertoj povas aplikiĝi en la planado de ekskursoj antaŭ - kaj postkongresaj ?**

– Certe, tiujn spertojn mi uzos por la UK. Estos nur multe pli

ampleksa laboro. Sed la celo restas la sama : malkovrigi nian landon aŭ regionon, interese kaj originale. Gravas, ke programoj estu diversaj, adapteblaj al diversaj personaj kapabloj kaj interesoj, kaj reprezentu bone nian landon. Gravas ankaŭ, ke laŭeble plej multe da tiaj turismaj spertoj okazu en Esperanto.

**Kiel vi vidas la ekskursan programon dum la UK ?  
Kion vi ŝatus nepre montri al niaj vizitantoj ?**


– Estas multege por montri : la landon mem, ĝiajn urbojn kaj diversajn pejzaĝojn. Sed, eĉ pli grave, ĝiajn kulturojn. Mi uzas pluralon, ĉar oni ne devas forgesi pri la franca deveno de granda parto de la kebekianoj, nek pri niaj indiĝenaj radikoj, nek pri la gravaj influoj de diversaj enmigrintaj popoloj. Estas tiu miksaĵo de influoj, kiun indas montri (kaj kiu, laŭ mi, mirigos niajn vizitantojn !). Ekzemple, ni proponos viziti indiĝenan vilaĝon, la « Pasinttempan kebekian vilaĝon » (nomatan france « Village québécois d’antan ») kaj sukerkabanon. Ekzistas proponoj pri biciklado, kanuado, promeno en arbaro. Estos vizitoj de etnaj kvartaloj, sed ankaŭ promenoj pri stratarto, arkitekturo... Ni devos elekti, kompreneble. Sed ĉiuj ideoj bonvenas. Ni konsideras, dum antaŭ- aŭ post-kongresaj ekskursoj, iri eble ĝis la Niagaro-akvofaloj, eble ĝis

Tadoussac, eble eĉ suden en Usono ĝis...  
Diskutende.

**Kion vi ŝatus, ke la homoj « forportu » hejmen,  
partopreninte la kongresajn ekskursojn ?**

– Mi ŝatus ke ĉiu, reirante hejmen, povu atesti pri la riĉeco de nia « latin-amerika » kulturo : Kebeko konsistigas ligan inter la « Klasika » latin-devena eŭropa kulturo kaj la « Moderna », amerika mondo ! Kaj pri nia gastamo. Kaj, kompreneble, ke ĉiu havu deziron reveni ! Ĉar restos multege da malkovrotaĵoj...

Bv. kontakti Suzanon per retpoŝto ĉe <roy\_248 ĉe hotmail.com>, se vi ŝatus kunlabori pri la ekskurso aŭ antaŭ- aŭ postkongresa programo.



*Intervjuis Ĵenja Amis*

Aŭskultu intervjuon de Suzano Roy al Radio-Canada dum MeKaRo-2018 (france) [ĉi tie](#).

# Tririvere kaj pluramike : Mia unua fojo ĉe MeKaRo

*Ryan (Riano) Callahan*

Ĉi-printempe, mi iris al mia unua Esperanto-kongreso en Nordameriko. Fakte temis pri la 15-a Mez-Kanada Esperanto-Renkontiĝo (MeKaRo) en Tririvero, Kebekio. Mi ja loĝas en Kanado, sed, kiel eksterlanda studanto, mi ne vere bone konis mian duan hejmon. Tio komencis ŝanĝiĝi dum MeKaRo.

Fakte, la amuzado komenciĝis unu tagon antaŭe, kiam mi kaj miaj amikoj Karlo kaj Steven renkontiĝis por festeto Esperantoparola sur la suda riverbordo de Montrealo. La postan matenon, ni pakis niajn valizojn kaj ekveturis al Tririvero. Dum unu horo kaj duono, ni babilis amike kaj veturis tra partoj de Kebekio, kiujn mi neniam antaŭe vidis.

Alveninte al Tririvero, ni iris al nia loĝejo, kie ni tri komune vivos Esperante dum la semajnfino. Post ĉi tiu formalaĵo, ni iris al la unua Esperanto-

evento, komuna manĝo en restoracio kun Esperanto-nomo : Mondo ! Ni fakte havis ŝancon, ĉar post la manĝo la Fiereca Parado pasis sur la strato antaŭ la restoracio. La urbo ne nur bonvenigis la Esperanto-movadon, sed ankaŭ la LGBT-movadon tiusemajnfine.



Sed la tago nur komenciĝis. Post la manĝo, ni faris viziton de la urbocentro. Apud la rivero estis artaĵoj kun poemoj sur ili. La poemoj venis kaj de Kebekio kaj de la tuta mondo. Ili estis ofte dulingvaj – en la lingvo originala kaj en la franca. Post nia

promenado tra la riveroparko, artgalerio, altaj stratetoj kaj historie anglaparolanta tombejo, ni denove kunvenis en la restoracio Mondo, ĉi-foje superetaĝe, por komuna manĝo kaj poezia vespero. Ĉiuj tradukis poemon en Esperanton kaj

montris siajn plej ŝatatajn fotojn de la vizito. Ni babiladis ĝis la nokto kaj por tiuj, kiuj ne lakis, la festumado daŭris post la noktomezo kun muzikumado kaj drinkado ĉe kelkaj Esperantistoj.

Nia dua tago estis aktiva tago. Ni havis la elekton inter muzeovizito kaj kanuado en la rivero. Fakte, mi neniam estis kanuinta antaŭe, sed la aliaj Esperantistoj konvinkis min provi – kaj mi tre ĝuis la sperton. Ni estis ĉirkaŭ dek en unu kanuo. Ĉiu partoprenanto estis grava, ĉiu havis rolon en la kanuo. Ni povis praktiki nian Esperanton parolante pri la naturo kaj pri kanuado. Ĝi estis tre bela sperto : nia gvidisto parolis al ni pri la historio de la urbo kaj pri la naturo. Bonŝance, ni povis poste rekompenciĝi post la fizika laboro per bongusta manĝo kun la Esperantistoj, kiuj estis elektintaj la muzeoviziton ĉi-matene. Sed la amuziĝo ne finiĝis tie : ni povis poste iri al tabulluda restoracio, kie estis bufedo (kun veganaj opcioj !) kaj pluraj bretaroj de tabulludoj. Pere de la tabulludoj, ni povis plivastigi nian vortprovizon en Esperanto kaj samtempe amuziĝi dum la vespero.

Bedaŭrinde, ĉio bona havas finon (nur kolbaso havas du) : lundo estis nia lasta tago en Tririvero. Ni pasigis la finan matenon en papermuzeo, kie ni



lernis pri unu el la plej grandaj industrioj de Tririvero kaj kie ni povis fari nian propran paperon (*vidu bildon supre — Red.*). Poste, ni promenadis tra granda parko, kiu havis buntajn dometojn por gnomoj kaj kie Normando Fleury instruis al ni pri la naturo. Tiam, MeKaRo venis al sia fino kun manĝo en la apudakva restoracio Borealis, kie ni ĝisrevidis niajn malnovajn kaj novajn amikojn el Ontario, Usono kaj ankaŭ de aliaj kebekiaj urboj. Mi esperas, ke ni vidos nin ĉiujn ĉe la venonta MeKaRo en Kingstono. Sed por ĉiam restos en mia koro la memoro de mia unua MeKaRo en Tririvero. Dankon al la ĉeforganizantino, Suzano Roy, kaj al ĉiuj aliaj Esperantistoj, kiuj faris el ĉi tiu regiona renkontiĝo belan sperton !

# Fina venk(et)o en Lisbono, aŭ : Kion mi lernis en mia unua UK

*Garry Evans*

Estas dimanĉmatene, komence de aŭgusto. Mi sidas en plenŝtopita metrotrajno, celante la urbocentron de Lisbono, ĉirkaŭata de turistoj, kiuj gaje paroladas... en Esperanto. Estas kiel la « fina venko » jam alvenis. La vizitantoj survojis al la solena malfermo de la 103-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto – mia unua sperto de granda Esperanto-renkontiĝo.

Mi baldaŭ ekkomprenis, ke estas ne unu UK, sed multaj. Estas homoj, kiuj partoprenas nur por turismi, kaj sendube Portugalio estas ege vizitinda lando, kun longa historio, ĉarmaj mezepokaj urboj, bongusta manĝaĵo ktp. Por homoj, kiuj parolas nur sian denaskan lingvon

kaj Esperanton (kaj ne la anglan aŭ alian « internacian » lingvon), ekskursi ĉiutage dum UK pere de Esperanto certe estas la plej facila maniero turismi. Tamen, por kulturemuloj, UK estas arta festivalo, kun muzikaj koncertoj diversspecaj ĉiun tagon, aŭtoraj duonhoraj, kun la plej renomaj verkistoj, kaj atelieroj pri diversaj artformoj. Sed UK estas ankaŭ unusemajna universitata kurseto : ĉiutage okazas deko de prelegoj pri malsamspecaj temoj – scienco, historio, mondpolitiko, informatiko kaj multe pli. Aliaj partoprenantoj venas al UK ŝajne nur por politikumi, por ĉeesti komitatajn kunvenojn, en kiuj oni diskutas – ofte fervore kaj



**Solena malfermo, Lisbono 2018**

longdaŭre – sekajn temojn kiel la jarkotiza sistemo de UEA.

Mia forta impresio estis, ke Esperantujo similas malgrandan landon, sed kun civitanoj disigitaj tra la tuta mondo. Ni havas niajn elstarajn poetojn kaj romanverkistojn, popularajn rok- kaj repmuzikistojn, plejaltnivelajn sciencistojn, kaj politikistojn – ekzemple la prezidanton (kaj eksprezidantojn) de UEA, kaj estrararojn de landaj Esperanto-asocioj. Komprenoble, la plejparto de ili partoprenas UK-on ĉiujare. Se uzi kanadan analogion, estas kvazaŭ Michel Tremblay kaj Margaret Atwood, Céline Dion kaj Justin Bieber, Donna Strickland (kiu ĵus gajnis nobelpremion pri fiziko), Justin Trudeau, Stephen Harper kaj François Legault ĉeestus la saman konferencon samtempe. Sed ne nur tio. Oni povas amike paroli kun eĉ la plej famaj esperantistoj. Mi antaŭnelonge legis la romanon de Mikaelo Bronŝtejn « Mi stelojn jungis al revado » (tre rekomendinda), kaj mi tre ĝojis, ke



dum la UK mi povis aŭskulti lian paroladon (kaj ankaŭ muzikkoncerton !) kaj babili kun li. Unu el miaj plej ŝatataj Esperanto-muzikistoj estas Jonny M : mi ne nur ĉeestis lian koncerton, sed ankaŭ igis lin subskribi t-ĉemizon por mi (kaj poste mi eĉ vidis lin ludanta en piedpilka matĉo).

Aparte surprizis min la alta kvalito de prelegoj. Mi ĉeestis kelkajn intereseajn prelegojn pri astronomio (ekzemple, pri planeda esplorado), fako, kiu tre interesis min, kiam mi estis junulo, sed kiun mi ne sekvis dum la lastaj jaroj. Mi estas profesie ekonomikisto, kaj mi aŭskultis prelegon tre altkvalitan pri eŭropa

demografio, fare de José Martins, profesoro pri ekonomiko ĉe la Universtato de Avejro. Krome, mi ĉeestis ankaŭ prelegon pri la estonteco de la Eŭropa Unio, de germana eks-ambasadoro, Ulrich Brandenburg, kaj paneldiskuton pri la enmigrada situacio en Eŭropo, kun partopreno de tri volontuloj, kiuj laboras en tiu kampo ; tiu homoj estis vere sagacaj.

Kompreneble ni kaptis la okazon por varbi por la Montreala UK, okazonta en 2020. Kvin el la ses anoj de nia Loka Kongresa Komitato (LKK) estis en Lisbono, kaj ni starigis budon (vidu foton) por disdoni broŝuron pri Montrealo, kaj paroli pri la urbo kaj niaj planoj. Ni ricevis diversajn demandojn, kelkajn neatenditajn, pri Montrealo. Ekzemple, ĉu ĝi estas facile atingebla? (jes, estas rektaj flugoj aparte el Eŭropo kaj Usono, sed ankaŭ el Ĉinio kaj Japanio). Ĉu estas malmultekostaj hoteloj proksime de la kongresejo? (jes, estas multaj). Ĉu oni povas trovi veganan manĝaĵon? (kompreneble). Eĉ, ĉu estas nudista plaĝo? (fakte jes, en Oka). Ni ankaŭ faris

solan prezentadon pri Montrealo antaŭ cento da aŭskultantoj, kiam Ĵenja Amis kaj Normando Fleury parolis pri la ĉarmoj kaj avantaĝoj de nia urbo. Poste, ni disdonis acerajn bombonojn al la publiko.

Certe, partopreni UK-on estis mirinda sperto. Sed ĉu ĉio plaĉis al mi? Eble ne. Mi konkludis, ke mi preferas pli malgrandan renkontiĝon (ekzemple ARE aŭ MeKaRo), kie oni havas tempon por babili malstreĉe kun ĉiuj aliaj partoprenantoj, kaj tiel amikiĝi. En Lisbono mi parolis kun multaj interesaj esperantistoj, sed plejparte nur mallonge kaj supraĵe.

### Partopreni UK-on = malkovri kulturajn trezorojn de la lando-gastiganto, je kiuj tiom riĉas Portugalio



Mi ankaŭ komprenis kiel malfacile estas aranĝi kongreson kun pli ol 1 500 partoprenantoj. Tiel mi ekhavis ideojn, pri kion ni faru, kaj ne faru, dum la Montreala UK. Ekzemple, en Lisbono la kongresejo eble ne tute taŭgis : la klimatizilo ne bone funkciis en la prelegejoj (kaj la temperaturo altiĝis ĝis 41 gradoj), la gardistoj ŝlisis la ĉefpordon je la 17-a horo, kvankam multaj kongresanoj ankoraŭ estis en la konstruaĵo, kaj la sonsistemo estis malbona, kaj tial la prelegoj ofte estis malfacile aŭskulteblaj. Mi esperas, ke la Ŝeraton Hotel, kie okazos nia UK, estos pli taŭga. Mi ankaŭ rimarkis la neceson havi bonan preparadon kaj sufiĉe da homforto por glate okazigi kongreson. En Lisbono, en la kongresejo ofte estis malfacile trovi la ĝustan ĉambron, ŝildetoj fojfoje eraris, kaj mankis volontuloj por respondi al homoj, kiuj serĉis informon. Mi ekkonsciis, kiom da volontuloj ni bezonos en 2020.



**La Montreala tablo estis tre populara !**

Mi certe rekomendus al iu ajn esperantisto partopreni almenaŭ unu UK-on. Estis, por mi, neforgesebla sperto renkonti homojn el ĉiuj partoj de la mondo. Mi babilis, ekzemple, kun iranano, kun orienttimorano, krom homoj el plej

« kutimaj » landoj en Eŭropo kaj Azio. Ne maltrankviliĝu pri la nivelo de via Esperanto. En la UK estas kompreneble multaj fluaj, elokventaj parolantoj, sed ankaŭ komencantoj kaj progresintoj. Fakte, ĉiutage okazas kursoj je diversaj niveloj.

La sekva UK okazos en Lahti, Finnlando en julio 2019. Mi supozas, ke la etoso iom malsimilos al tiu de Lisbono, ĉar ĝi okazos en kampara regiono, kun malpli da eblecoj por viziti turistajn vidindaĵojn, sed, male, multe da okazoj

por sportumi, promeni en arbaroj ktp. Kaj ne forgesu : la Montrealo Universala Kongreso okazos inter la 1-a kaj la 8-a de aŭgusto 2020. La LKK memfidus, ke ni kapablos aranĝi por vi ĝuindan kaj memorindan UK-on.



# Usona-Kanada komuna Kongreso 2018 : sukcesego !

*Ardeo Mann*

De la 13-a ĝis la 16-a de julio 2018 okazis la Landa Kongreso de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto-Asocio en Seatlo, Vasingtonio. Okazis ĉe universitato, do la partoprenantoj dormis en la studentaj loĝejoj kaj ĉeestis prelegojn en la klasĉambroj.

Estis speciala kongreso pro multaj kialoj, kaj unu el ili estis la specialaj gastoj. *La Perdita Generacio* koncertis dum la lasta vespero de la kongreso, kaj konataj Esperantistoj, kiel Chuck Smith kaj Federico Gobbo, ankaŭ prelegis.

La temoj de la programeroj estis

vastaj, de la UK en Montrealo ĝis leciono pri kiel bone pardonpeti. Ankaŭ estis gufujo<sup>1</sup> kaj aligatorejo<sup>2</sup>, kiuj estas kutimaj amuzaĵoj ĉe aliaj aranĝoj sed aperis pli lastatempe ĉe aranĝoj kiel la Landa Kongreso. Multaj ĉeestantoj parolis la hispanan kaj la francan kiel ne-denaskajn lingvojn en la aligatorejo.

Unu el la ĉefaj sukcesoj, laŭ mi, estis krei esperantlingvan etoson, kiu taŭgis por la diverseco de la partoprenantoj. Kiel juna Esperantisto, mia plej ŝatata programero estis la neoficiala : babili kun novaj kaj malnovaj amikoj sur la



**La koncerto de la sveda grupo *Perdita Generacio***

herbejo. Mi ne ofte havas la ŝancon umi kun Esperantistoj de mia aĝo, kaj ĉiam estas mirinda sperto. Ankaŭ estis pli akademiaj prelegoj kaj formalaj ebloj por pli maturaj Esperantistoj.

Ĉeestis pluraj komencantoj kaj novuloj, ĉefe dank'al la Esperanta kurso ĉe Duolingo, kaj ankaŭ al ĉiusemajna komencanta rondo en la urbo Seatlo. Ŝajnis, ke ili amuziĝis kaj kelkaj eĉ ĉeestis la postkongresan tendumadon ĉe Monto Rainier apud Seatlo. La plejmulto da partoprenantoj estis el Usono, sed ni estis kelkaj el Kanado kaj Kebekio.

Estis sukcesa kaj bone



**Vilĉjo Harris, la direktoro de la CO de Esperanto-USA, estis honorita**



**Haruo (Leland Ross) donacis al la kongresanoj specialan Zamenhof-kafon !**

organizita kongreso. Mi ĝuis ĉiujn flankojn kaj sentis min tre bonŝanca pro la eblo partopreni. La organizantoj de la venonta Landa Kongreso en Bostono ĉeestis, kaj ŝajnas ke ili organizos sambonkvalitan kongreson ĉe la alia marbordo venontsomere.

*1. Gufujo estas la nokta tetrinkejo dum Esperanto-aranĝoj, precipe junularaj. Ĝi estis inventita kiel alternativa trinkejo, strikte sen fumado kaj sen alkoholo (laŭ Vikipedio).*

*2. Tiu programero estas farita por ke la partoprenantoj havu okazon praktiki ankaŭ aliajn fremdlingvojn ol Esperanto dum internacia renkontiĝo (laŭ Vikipedio).*

# ARE 25-jara !

*Normando Fleury*

**Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto ARE festis sian arĝentan jubileon en oktobro 2018. Dum la kvaronjarcento, ĝi atingis 1 135 partoprenojn (45 homoj mezume ĉiufoje) el 11 landoj. Modesta renkontiĝo kompare al la UK-o, sed tamen utila evento por plifortigi lokajn movadojn.**

Agi regione povas havi grandan efikon, laŭ mi, aparte se temas pri internacia regiona aranĝo. Antaŭ 25 jaroj, en 1994, Esperanto-Societo Kebekia (ESK), ligo kun Esperanto-Societoj de Novjorko kaj Bostono, okazigis la unuan komunan renkontiĝon nomitan ARE : Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (inter 1994 kaj 2004 ĝi nomiĝis « Okemo » ).

Nu, la aranĝo daŭre venigas kutime pli ol kvardeko da Esperantistoj ĉiujare, inter ili estas ankaŭ multaj komencantoj kaj novuloj en la Movado. Kun la jaroj, ARE nun kunigas membrojn el deko da kanadaj kaj usonaj kluboj en belega

historia YMCA-gastejon ĉe lago George meze de Novjorkia ŝtato en Usono.

Por la 25-a ARE, la programo estis bunta. Okazis bonvenigo fare de Tomaso Alexander, poste Zdravka Metz gvidis literaturan horon. Poste mi prelegis pri la malapero de la tutmondaj arbaroj. Sabate okazis la amikeca vespero, kaj la temo estis ligo al la Internacia Jaro de Koralaj Rifoj en 2018. Dimanĉe Bill Maxey prelegis pri la kosmo : Poemcirklo de John Francis. Sekvis Suzano Roy (« Suzano la dua »), kiu enkondukis nin al maĝango, antikva ĉina ludo. Antaŭ la tagmanĝo, Tamara Koziej dancigis nin per biodanco. Oratora

horo okazis sub la gvido de Zdravka, kaj tiu programero daŭre estas populara kun tre diversaj temoj. Paralele, komencantoj povis ĉeesti kurson kun Steven Farrington. Eblis babili kun Tomaso pri liaj jutubaj elsendoj *Tempo kun Tomaso*.

La vetero tute ne belis ĉi-jare, tiel ke pluraj personoj simple ripozis dum la libera tempo. Kulmino de la dimanĉo estis la kultura vespero en granda aŭditorio kun vasta scenejo. La ejo ne estis varmigita, sed, nu, kvardeko da homoj ja povas varmigi la etoson ! Esperantistoj, kiuj dancis, kantis, muzikis aŭ aktoris tiom bone faris, ke la publiko estis ravita kaj laŭte aplaŭdis.

Jen estis lundo, kaj Tony Harris prezentis al ni sian « hejman tigron », tiel estas li parolis pri katoj. Mi prezentis poste la progresojn rilate la 105-a UK en Montrealo en 2020.



Fine, Tomaso kolektis la proponojn por plibonigi la venontajn ARE. Estis dankoj al Tomaso, la ĉeforganizanto de ARE, al Timoteo, kiu kreis

novan bonan retejon, kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis al la programo kaj sukceso de la 25-a ARE.

Laŭ mi, tio, kio plej gravas, estas ke ARE ebligas al Esperantistoj, kiuj kutimas uzi Esperanton nur ene de sia loka klubo, sperti internacian etoson kaj utilecon de la lingvo. Ofte klubaj sperto limiĝas al 2-hora konversacio inter kelkaj Esperantistoj, sed ARE ebligas babiladon dum tri tagoj, do ĝi donas la eblecon lertiĝi kaj sperti vivantan lingvon. Mi aldonu, ke ARE allogas la tutan gamon da partoprenantoj : junuloj, familioj kaj pliaĝuloj, kiuj kune

konatiĝas kaj amikiĝas. La plej juna partoprenanto estis 2-jara denaskulo kaj la plej aĝa pli ol 80-jara.

## 25-a ARE en fotoj




# Adhèrez à l'Association mondiale d'espéranto

*Sylvain Auclair*

Au cours des dernières années, le membrariat — et donc les finances — de l'Association mondiale d'espéranto a connu un déclin inquiétant. Ce dernier est sans doute dû à la facilité nouvelle d'utiliser l'espéranto hors des réseaux traditionnels de clubs et d'associations, principalement grâce à Internet. Ce déclin touche en effet un grand nombre d'associations et d'organismes comparables. Mais il n'en est pas moins inquiétant. L'Association mondiale d'espéranto, souvent appelée UEA, l'acronyme de son nom espéranto, *Universala Esperanto-Asocio*, joue en effet des rôles qu'aucun autre organisme ou regroupement n'est en mesure de remplir. C'est elle qui permet à des groupes d'espérantistes d'émerger dans des pays pauvres et sans histoire espérantiste ; c'est elle qui représente le

mouvement espéranto auprès des organisations internationales, en premier lieu l'ONU et l'UNESCO ; c'est elle qui coordonne — ou tente de coordonner — l'action des associations nationales.



Et c'est l'UEA qui organise les Congrès mondiaux d'espéranto (UK : *Universalaj Kongresoj*) en collaboration avec une équipe locale, comme celui qui se tiendra à Montréal à l'été 2020.

Devant ces perspectives alarmantes, l'instance décisionnelle élue de l'UEA a revu de fond en comble les modalités d'adhésion et a mis fin à l'impression et à l'envoi annuels du *Jarlibro*, qui répertoriait toutes les instances du mouvement espérantiste ainsi qu'un réseau de délégués classés par pays et par ville, document imprimé

devenu désuet à l'heure du web. Les cotisations deviennent plus élevées pour les habitants de pays riches, mais plus basses pour ceux des pays moins bien nantis. La cotisation de base, qui inclut l'accès à la version électronique de la revue mensuelle *Esperanto*, passe pour nous de de 37 à 70 \$ (pour les 26 ans et plus : c'est moitié prix pour les 20-25 ans et le quart pour les 19 ans et moins) ! Mais, comme on dit, il faut c'qu'i' faut !

L'espéranto étant une langue internationale, le mouvement qui la soutient doit être mondial. Le meilleur moyen d'appuyer un tel mouvement est de mettre la main à la poche et de devenir membre de l'UEA. Je vous y invite. Ce serait de plus une excellente manière de montrer au monde notre engagement envers l'espéranto à la veille de recevoir des représentants de partout au monde : <https://uea.org/alighoj/alighilo/kanado>


## Kaj kion VI portos al Montrealo-2020 ?

Ĉu vi pensas ĉeesti la UK-on 2020 ? Perfekte, ni jam volas taskigi al vi ion ! ☺ **Tasko unu ! Certigu, ke vi havas libertempon 1-8-a de aŭgusto 2020 kaj komencu kolekti monon por la vojaĝo !** Iomete da stipendimono haveblas el la UEA-fonduso por helpi partopreni UK-ojn. Se vi ne estas en situacio de bezono kaj ŝatus helpi venigi pli da homoj al la UK-oj, donacu iom da mono al tiu fonduso ([financoj@co.uea.org](mailto:financoj@co.uea.org)) aŭ al [KEA por UK-2020](#).

**Tasko du ! Pripensu, kiel vi povus kontribui al la programo !** Ni esperas

havi la plej diversecan kaj riĉan programon, kun multaj prelegoj pri Kanado kaj Nord-Ameriko, kaj kun elstara arta kaj muzika programo. Montru al aliaj esperantistoj vian talenton, aparte se vi neniam antaŭe partoprenis aŭ kontribuis al UK-oj !

**Tasko tri : volontulu !** Por sukcesigi tiun ĉi tre ambician projekton ni bezonos multajn volontulojn. La taskoj estos plej diversaj : bonvenigi homojn, gvidi ekskursojn, verki, traduki, foti, ktp. **Se vi ŝatus volontuli, plenigu tiun ĉi formularon :** [tiny.cc/volontuloj2020](http://tiny.cc/volontuloj2020)



# LangFest : lingva festivalo montrealstile

*Nicolas Viau*

LangFest Montréal – la Montreala Lingva Festivalo – okazis de la 21-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2018 ĉe Universitato Concordia en Montrealo. Tiu tria okazigo estis jen plia granda sukceso ; ĝi altiris multege da

partoprenantoj, ĉefe el diversaj lokoj de Kanado kaj Usono (60% kaj 30% laŭ la unuaj datumoj), sed ankaŭ el pli foraj landoj, kiel Francio kaj eĉ Egiptio !

## Kio novas ĉi-jare ?

Ĉi-jare la programo de la Festivalo celis homojn kun diversaj interesoj rilate lingvojn, ne nepre nur plurlingvemulojn aŭ homojn, kiuj ŝatas lerni lingvojn (kvankam klare

oni daŭre multe traktas tiujn temojn). La festivalo sekvis la vojon jam komencitan en 2017, sed la ĉi-jara programo estis eĉ pli diversa, kaj tio grave kontribuis al la sukceso kaj renovigo de la evento.



**Tony Harris, el Vermonto, kiu ĉeestis LangFest, ricevis de Ĵenja Amis la atestilon pri sukcesa KER-ekzameno !**

Krom lingvolernado, oni do traktis temojn pli sociajn, kiel la povo de diversaj lingvokomunumoj je monda nivelo – ekzemple, okazis prelego pri lingvo kaj povo (fare de mi mem), estis prelegoj pri interpretado, malplimultaj lingvoj... tre Esperantecaj temoj. Kaj ni ne forgesu menciigi enkondukajn atelierojn pri diversaj lingvoj (ekzemple, la germana, la surinama kreola lingvo... kaj Esperanto)



kaj prelegojn pri dulingva edukado, lingvoj kaj kinarto, lingvistiko (Jessica Coon, la lingvokonsultisto por la filmo *Arrival*), la internacia fonetika alfabeto, kaj eĉ prelegon pri lingvoj kaj sporto !

## Ankaŭ Esperanto ĉeestis !

Esperanto ne kaŝis sin sum la evento. Danke al la malavara subteno de la Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperantic Studies Foundation, oni starigis budon por prezenti la lingvon al aliaj partoprenantoj, same kiel pasintjare. Same kiel antaŭe, ankaŭ ĉi-jare oni sentis scivolemon kaj intereson pri la lingvo, kaj eĉ vidis kelkajn novajn Esperantistojn ! Varbiloj rapide disdoniĝis. Dum la aliĝo, cetere,



proksimume 6% diris, ke ili scipovas paroli Esperante.

Le tre fama Esperantisto Chuck Smith ĉeestis. Li prelegis pri la komunumoj, kiuj parolas diversajn planitajn lingvojn – Esperanton kompreneble, sed ankaŭ aliajn. Li ankaŭ gvidis enkondukan atelieron pri Esperanto, kiu estis sukcesa, kaj prezentis al la ĉeestantoj la bazon de la lingvo, ĝiajn sonojn kaj bazajn vortojn.

Ni ankaŭ havis la bonŝancon partneriĝi kun Amikumu, unu el la plej konataj produktoj de Esperantujo – ankaŭ ekster la Esperanto-mondo. La fluo de Amikumu estis montrata sur ekrano, kaj pluraj partoprenantoj uzis ĝin.

Ĝenerale, mi pensas, ke tiaj partneriĝoj inter lingvemuloj kaj Esperantistoj tre valoras ; temas



**Multaj personoj haltis ĉe Esperanto-tablo ĉe LangFest. Pluraj jam komencis lerni ĝin, aliaj vive interesiĝis, kaj ĉiuj promesis veni al la unua UK en Montrealo en 2020 ! Spektu etan videeton pri la Esperanto-tablo (klaku sur la dekstran bildon)**

pri tre natura alianco. Estas intereso pri Esperanto inter tiuj lingvemaj rondoj, kaj multaj Esperantistoj estas lingvemuloj.

Plie, ni aperigis reklamon pri Esperanto kaj la Universala Kongreso en Montrealo-2020 en la programlibreto. Homoj devas scii, ke Montrealo estas unu el plej gravaj urboj por lingvoŝatantoj en Nordameriko. Kiu alia urbo povas diri, ke tie okazis jam de 2016 trifoje lingva festivalo ?!

Oni parolas ankaŭ pri kunlaboro inter la UK kaj LangFest en 2020. Ambaŭ eventoj okazos en Montrealo, kaj ili nature kunlaboremas.

La subteno de ESF kaj KEA estis agnoskita en la programa libreto, sur la nomŝildoj, kaj dum la malferma kaj ferma ceremonioj.

## Dankoj


Mi estas aparte dankema al Ĵenja Amis pro ŝia helpego pri la libreta reklamo kaj la rapida kreado kaj presado de la novaj varbiloj. Mi ankaŭ dankas al ŝi, Joel Amis kaj Garry Evans pro ilia afabla deĵorado ĉe la budo dum la evento.

Video: <https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso/videos/248887682498468/>

# Malpli oftaj fundamentaj vortoj 8

*Francisko Lorrain*

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la oka ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj [ ]. Alta <sup>Z</sup> indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta <sup>X</sup> citaĵon el la *Hebrea Biblio* (Malnova Testamento) laŭ la Londona eldono, alta <sup>B</sup> citaĵon de K. Bein (« Kabe »).



Ĉi-foje mi invitas vin kompari la radikojn **damaĝ** kaj **domaĝ**. La unua aperas en NPIV, sed kiel neoficiala aldono al la Fundamento, kvankam ĝi estas sufiĉe ofte uzata. La dua estas fundamenta radiko. Gravas kompari ambaŭ, ĉar pri ili oni facile konfuziĝas. Kiel vi vidos, strangas, ke la substantivoj **damaĝo** kaj **domaĝo** havas tre proksimajn signifojn, dum la signifoj de la verboj **damaĝi** kaj **domaĝi** estas preskaŭ malaj.

Ambaŭ radikoj kontrastas ankaŭ pro alia fakto. La radiko **damaĝ** estas *verba* radiko, t.e. la verbo **damaĝi** estas ĝia ĉefa derivaĵo, kio faras, ke **damaĝo** nepre estas ago damaĝi, aŭ la rezulto de tia ago. Malsame, **domaĝ** estas *substantiva* radiko, t.e. ĝia ĉefa derivaĵo

estas la substantivo **domaĝo**, kio faras, ke la rilato inter la baza formo **domaĝo** kaj la derivata formo **domaĝi** povus esti, aprioro, kiu ajn. Nu, ĉu vi rimarkis, ke Esperanto foje ne estas perfekte logika ?

Oni antaŭe multe uzis la verbon **domaĝi**, dum hodiaŭ oni preskaŭ ne plu uzas ĝin, eble pro la priparolita facila konfuzo. Sed gravas bone kompreni tiun verbon, ĉar ĝi relative oftas en malnovaj tekstoj. Direndas tamen, ke oni foje renkontas ĝin ankaŭ en nuntempaj cirkonstancoj.

**damaĝ/i** (tr) Malutili al iu, kaŭzante materian aŭ moralan perdon : *la striko ~is la najbarajn industriojn ; la imposta fraŭdo multe damaĝas la*

ŝtaton ; (figurasence) ~i ies reputacion. ☞ difekti. → domaĝi. ~o. Malprofito kaŭzita al iu per ies agado : kompensi la faritajn ~ojn. ☞ dolo. milit~oj (juro) ~oj, kaŭzitaj de milito al domoj, bienoj, industrioj ks.

★ **domaĝ/o**. Perdo aŭ difekto, kiun oni volus ne vidi, ne suferi : *estas ~o, ke ni devas akiradi la mondon en tia maniero<sup>Z</sup> ; post ~o venas saĝo<sup>Z</sup> ; kia ~o !<sup>Z</sup>. ☞ averio, damaĝo, ve, bedaŭrindaĵo. ~a. Bedaŭrinda : *jen ~a afero !. ~e*. Bedaŭrinde : *estas ~e pri<sup>Z</sup> ; estas ~e, ke<sup>Z</sup> ; kiel ~e !. ~i* (tr) **1** Timi bedaŭrindaĵon, difekton, pardon pri io ; deziri ŝpari, konservi, ne elspezi, ne difekti ion : *li ne aĉetis la libron, ĉar li ~is la monon<sup>X</sup> ; li ne eliris en la**

*pluva vetero, ĉar li ~is sian veston<sup>Z</sup> ; kiu ~as groŝon, perdas la tutan poŝon<sup>Z</sup> ; pafu, k ne ~u sagojn<sup>X</sup> ; ne ~i sian penon ; se la proponanto ~as la elspezojn, kun kiuj la proponado estas ligita [...]<sup>Z</sup> ; tiel longe, kiel li havis ankoraŭ propran kapitalon, li nenion ~is<sup>Z</sup> ; li forkuris, ĉar li ~is sian vivon<sup>Z</sup>. ☞ avari. **2** Timi malutili al iu, timi ofendi aŭ dolorigi iun, indulgi : *pro spritaĵo li eĉ patron ne ~us<sup>Z</sup> ; vi ~as la hederon, kiu dum unu nokto elkreskis k dum unu nokto pereis, k ĉu Mi povus ne ~i Nineven, la grandan urbon ?<sup>X</sup> ; ankaŭ min oni ne devas piedpremi, ankaŭ min oni devas ~i !<sup>B</sup>. ☞ kompati, ŝpari.**

## Matthew Chisholm (1978-2018)

Matthew (Mateo) J.S. Chisholm (1978-2018), sekretario de KEA, kaj prezidanto de Esperanto-Toronto mortis la 1-an de aŭgusto en Toronto, unu semajnon post la forpaso de lia partnero Jake Freeman. Mateo estis unu el la plej aktivaj esperantistoj en Kanado, ekstreme kapabla, vizia kaj helpema persono. Inter multegaj kontribuoj al la Movado, Mateo organizis MeKaRon en Toronto (2015), kiu estis en tiu jaro la plej granda Esperanta renkontiĝo en Nord-Ameriko. Li esperis je la plej granda sukceso de la UK en Montrealo en 2020, kaj ni certe honoros lin dumkongrese. Li treege mankas al ĉiuj esperantistoj en Kanado...



# Ido, la malamiko

*Silvano la Lacerto Auclair*



L'ido est né, selon les espérantistes, d'un schisme mené en 1907 par Louis de Beaufront, qui était à l'époque un des leaders du mouvement espérantiste. Un comité mis sur pied par la *Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale* avait étudié tous les projets qui lui avaient été soumis et avait choisi l'espéranto, à condition qu'il fût modifié dans le sens d'un projet nommé *Ido*, soumis anonymement par celui, apprendrait-on plus tard, qui devait justement défendre l'espéranto au sein du comité. L'Académie de l'espéranto refusa les modifications, affirmant que le but du comité était de choisir et non de modifier ; les idistes affirment pour leur part que le comité avait choisi l'ido à l'unanimité, y compris ses membres espérantistes.

Notons qu'*ido* signifie, en espéranto, *descendant*, mais qu'il fait aussi référence à l'*Internacia Delegitaro*. Une fois ouverte la porte des schismes, l'espéranto connut une très nombreuse descendance, dont les membres sont pour la plupart très obscurs et sont connus sous le nom générique d'*espérantides*.

Estis malfacile al mi naski tiun artikolon pri Ido. Ne nur tiu lingvo havas kun Esperantistoj malfeliĉan historion, ĉar ĝi naskiĝis, laŭdire, de la perfido de gvidanto de la tiama Esperanto-movado, sed ĝi estas tiel simila al Esperanto, ke estas malfacile priskribi ĝin.

La bazo de Ido estas kritiko pri Esperanta derivado. Kun la demando « *Kio estas la signifo de "grando" ?* », Louis Couturat konkludas, ke necesas renversigebleco en la derivado. Se la ago manĝi estas manĝo, kial krono ne estas la ago kroni ? Se kronado estas ago, kio do estas ĉapelado ? Se homo estas iu/io homa, kial granda ne estas iu/io granda ? Tial la kreintoj de Ido draste sistemigis la derivadon. En Ido, *belo* estas iu bela (belulo en Esperanto). Tio liberigis la sufikson -ul-, kiu nun povas montri virecon. Do *belo* povas estis *belulo* aŭ *belino*. Tiel la genra malsimetrio de Esperanto estis jam korektita en Ido antaŭ pli ol jarcento. Pri verboj estas same : la verbo *kronar* (= kroni) signifas *esti krono*, same kiel, en Esperanto, oni povas kanti, ke *La vivo rozas* ; por *kroni*, *meti al iu kronon*, Idistoj devis krei novan sufikson : -izar. Por *agi per la radiko*, on devas uzi

la sufikson... *agar* : *martelagar, krucagar*  
anstataŭas marteli kaj krucumi.

Pri adjektivoj estas same : ĉar la vorto *logika* signifas *kiu estas logiko* (tiel, *ruina kastelo* estas kastelo, kiu estas ruino, male de *gardena pordo*, kiu certe ne estas ĝardena), por la signifo de la Esperanta vorto *logika*, necesas nova sufikso. La du ĉefaj adjektivigaj idaj sufiksoj estas -ala kaj -oza. La unua signifas simplan rilaton, kaj la dua la fakton havi. Tiel ni ricevas vortojn kiel *universala, dorsala, nazala, faciala, ventrala, nacionala, normala, experimentala, finala, komencala, administrala, baptala, mariajala, guvernala, ordinala, konfidencala, glorioza, virgoroza, poroza, danjeroza*. Mi ne povas ne rimarki, ke tiuj



*La Kompleta gramatiko detaloza de la linguo internaciona* ([www.ido-vivo.info/kgd.pdf](http://www.ido-vivo.info/kgd.pdf)), kiu neniam preterpasas la okazon kritiki Esperanton, stas jene : *Pri la decido koncerne la tonika acento en Ido e la studiado qua preparis lu, videz l'apendico unesma, ye la fino dil gramatiko. L'acentizo en Es-po esas pura imito dil acentizo Polona.*

vortoj tute hazarde ofte reprenas la vortojn de la naciaj lingvoj, kiel la Franca aŭ la Angla. Kial idistoj uzas la adjektivon *logikala* ? Ĉu logika dedukto vere ne enhavas logikon ? Ĉu la similecon kun la angla vorto *logical* vere ne ludas pli gravan rolon ? Ĉu *religioza homo* vere enhavas religion ?

## Pliaj similecoj kun naciaj lingvoj

Ido komencis la vojon al pli da *naturaleco* en helplingvoj, kiu kondukis al projektoj kiel Interlingua (*La Riverego*, n-ro 107). Idistoj uzas nur la 26 literojn de la latina alfabeto, sen kromaj signoj. La litero q uziĝas kun la litero u, en vortoj kiel *quo, qui, quankam* ; la litero w en vortoj kiel *wato, wiskio* ; la litero x prononciĝas kiel ks aŭ gz, kvankam mi dubas, ke iu iam elparolis la nomon *Mexiko* kiel *meziko*... Fine, la litero y anstataŭas la Esperantan j-on, en vortoj kiel *yuro* aŭ *krayono*, tiel ke j povas indiki la sonon ĵ. Oni krome trovas la grupojn ch (= ĉ) kaj sh (= ŝ). La sono ĥ tute

*Grande eroras Esperanto uzante sua afixi kom radiki : 1e to duobligas neutile la vorto por la sama koncepto (pro quo ilo apud instrumento, od inverse ?) ; 2e to konstante ruptas por profani la kompreno di texto. Ema, eblo, inde, eta, aro e. c. esas por ili tam misterioza kam edzo, fraulo e. c. e la famoza korelativi : chiam [tiel], kie, iom, ia, iel, chiu [tiel] e. c., qui ja per su ruptas la kompreno sat freque.*

malestas. Aĥ ! Tiuj Francoj !

Akcento falas kiel en Esperanto, **krom ĉe la verbaj infinitivoj**, kiuj finiĝas per -ir, -ar aŭ -or (laŭ la tempoj estinta, estanta aŭ estonta). Kiel en la Hispana, tiuj finaĵoj estas akcentataj.

En la kuro al naturaleco ankaŭ malaperis ĉiuj tabelvortoj, anstataŭitaj de vortoj kiel *quan, lore* (tiam [alors]), *omna, ulu, ube, hike, pro quo*. Same ne eblas uzi afiksojn kiel memstarajn vortojn.

Malaperis ankaŭ la plej Esperanta prefikso mal-. Ja ekzistas prefikso des- (kiel en *desfelica*), sed oni trovos ofte vortojn kiel *basa, lejera, apertar, sinistra* (maldekstra !), *kurta, kolda*, kiujn oni foje retrovas en Esperanto, foje iom modifitaj (leĝera, aperti). La adjektivo *mala* signifas malbona.

La ŝanĝo en la alfabeto, sed ankaŭ la nura deziro

plibonigi Esperanton, kondukis al pluraj aliaj ŝanĝoj en la vorttrezoro. Ĉar *leda* signifas malbela, Idistoj devis enkonduki la vorton *ledro*. Ĉar *lenta* anstataŭas malrapida, *lenso* devas signifi kaj lenton kaj lenson. Biblio bonvene iĝis *Biblo*, zorgi iĝis *sorgar* (la Germana devenvorto estas *sorgen*), sed kial mano iĝis *manuo* (prononcu : manŭo) ? Verŝajne por derivi el ĝi la adjektivon *manuala*, mi emas kredi.

Kvankam oni notas plurajn angladevenajn vortojn, la kreintoj de Ido ankaŭ forprenas de la vorttrezoro kelkajn germanajn vortojn, kiel tago, anstataŭita de *dio* (kaj Dio iĝas *Deo*), drato, anstataŭita de *metalfilo*, haŭto, antataŭita de *pelo*.

Tamen, estas amuze noti, ke la Esperanta sufikso -end- unue uziĝis en Ido... Same por *koram*, vorto, kiun iuj klopodis enporti en Esperanton (kun la signifo *antaŭ* en figura senco, kiel *koram juĝisto*).

Ido ankaŭ importis multajn sufiksojn por aspektigi sian lingvon pli natura, kiel -ur- (*skulturo, bavuro*), -ier- (*pomiero, kandeliero*), -e- (*rozea, oranĝea* —

*Pri sendario : L'Espisti dicas sen skrupulo : adresato, segun la Germana ekspreso adresat. Ico esas duopla eroro.*

por ŝpari la longon de rozkolora... sed -aĵ- ne plu signifas viandon, tiel ke ldistoj diras *bovkarno* aŭ *porkokarno*), -er- (*arkero, fumero* : amatora arkisto, fumanto), -ari- (ricevanto de, kiel en *sendario, depozario*). Pro la signifoŝanĝo de -er-, ldistoj devas diri *sabluno, greluno* (hajlero), *nevuno* aŭ *nevo-floko*.

## Sed ankaŭ pli da malsimilecoj

En sia emo reformi Esperanton, ldistoj foje vojeraris kaj pluaplikis skemisman logikon tute kontraŭan al la emo al naturaleco, kiu ĝenerale gvidas ilin. Mi jam menciis la kunekziston de tri infinitivoj, estinta, estanta kaj estonta, kio tre malofte ekzistas en naturaj lingvoj. La montraj pronomoj kaj adjektivoj estas almenaŭ tiom skemismaj, kiel la Esperantaj *tiu* kaj *ĉi tiu*. Baze estas du vortoj : *ta* aŭ *ita*, por tiu; kaj *ca* aŭ *ica*, por ĉi tiu. Plurale, la fina -a iĝas -i. Por tio/ĉi tio, ĝi iĝas -o. Sed ili povas ankaŭ montri la sekson per almeto de la personaj pronomoj. Oni tiel ricevas vortojn kiel *ilca, ilti, elci, elta, olca, olta*... Mi devas

Ekzemplo de frazo kun montraj adjektivoj kaj pronomoj : *Me havas du hundi ; ica esas malada, e co jenas me ; ma ita esas nefatigeble, e to esas tre utila ad me por chasar en (i)ca lando.*

konfesi, ke jen estas la vortoj, kiuj plej konfuzis min, dum mi provis legi ldajn tekstojn.

## Kelkaj elementoj pri gramatiko

Je la unua vido, ldo tre similas Esperanton, krom la manko de cirkumfleksoj : la substantivoj finiĝas per O, la adjektivoj per A, la adverboj per E, la verboj per AS, IS, OS, US... Sed tio estas pli-malpli ĉio. La pluralaj substantivoj finiĝas per I (kiel la *du hundi* de la supra ekzemplo) ; la adjektivoj ne ŝanĝas sian formon por pluralo aŭ akuzativo, kaj povas perdi sian finan A-on. La volitivo finiĝas per... EZ (laŭdire pro la Franca *venez, allez*...) Neniu vorto plu finiĝas per -aŭ : *anke, ante, hiero*...

Same kiel en Esperanto, la artikolo esta LA ; sed ekzistas ankaŭ LE, antaŭ nemarkita plurara vorto. Ekzistas ankaŭ LO, kiel en *lo bela* (la belo), iel kiel en la Hispana, sed ĝi, post analizo, estas pronomo. Kiel en la Franca aŭ la Itala, la artikolo povas kuniĝi kun kelkaj prepozicioj : *al, dal, del, dil*.

Tamen estas en tiu lingvo elementoj, kiujn oni devas konsideri bonaj. La trosignifa Esperanta prepozicio *de* dividiĝas en *da* (por montri aganton), *de* (por montri deirpunkton [sed ankaŭ ekzistas *depos* = depost] aŭ enhavon kaj kvanton),



kaj *di* (por montri la posedon). Mi jam menciis la genran simetron. Anstataŭ direktan akuzativon, Ido uzas apartajn prepoziciojn, kiel *aden* (en -n), *adsur* (sur -n)... Kaj ĝenerale mankas en Ido la malfacile prononceblaj konsonantsinsekvoj de Esperanto : *savar*, *cienco*, *santa*, *quar*, *okacent* (= scii, scienco, sankta, kvar, okcent). Apud la vorto *patrino*, ankaŭ ekzistas *matro*.

## La akuzativo

Kompreneble, ĉar kreita unuarange de Francoj, Ido ne povas uzi sisteman akuzativon, kiel faras Esperanto. En normalaj frazoj, kiuj sekvas la kutiman vortordon, tute ne estas akuzativo ; fakte, estus eraro uzi ĝin. Kiel mi jam diris, nek ekzistas direkta akuzativo. La akuzativon Ido uzas nur en inversitaj frazoj — kiel ĉi tiu.

*Esus kulpo uzar la n por indikar (quale en Esperanto) la komplemento direkta, se ol ne preiras la subjekto, o por indikar la dati, la disto, la preco, e. c., o por la translaco aden loko. La n inversigala devas ne uzesar exter la limiti fixigita supere. Tale ol restas, ne kaptilo e kompliko neutila en 8 foyi ek 10 adminime dil uzado Esperantala, ma nur moyeno impedar, mem preventar miskompreno, o se-  
quar en traduko — se to utilesas — la ordino dil texto originala.*

*Omna homi naskas libera ed egala relate digneso e yuri. Li es dotita per raciono e koncienco e devas agar vers l'una l'altra en spirito di frateso.*

Fakte, plej ofte, la akuzativa formo — N, kiel en Esperanto — vidiĝos en demandaj frazoj kaj rilataj subfrazoj : *Quon vu vidas ? La homi qui venis ; la homo quan me vidas ; la homi quin\* me vidas.* (\*Pro tiu *quin*, akuzativa formo de *qui* [= kiuj(n)], la nombro kvin estas *kin*).

## Konklude

Kvankam Ido estas kreaĵo de Esperantisto, kiu ne povis estimi Esperanton tian, kia ĝi estis, kiu versajne taksis logikon pri grava ol liberan kapablon kompreni kaj uzi lingvon homan, kaj kiu certe ne ŝatis esti en la dua loko en la Movado, ĝi tamen estas tute uzebla lingvo, kiu versajne estas nek pli bona nek malpli bona ol Esperanto : iliaj kvalitoj nur estas malsamaj. Kompreneble, ĝi aspektas stranga al Esperantisto, kun vortoj kiel *beleso*, *koqueyo* (kuirejo) kaj *redeskar* (ruĝiĝi), sed tiu rapide komprenos ĝin. Sen forta bazo de parolantoj, la Idista movado rapide malfortiĝis, des pli certe, ke iuj centraj gvidantoj plu reformemis : Otto Jespersen baldaŭ kreis Novialon ; Wilhelm Ostwald kreis Weltdeustch-on.

Ankaŭ la kreo de Occidental delogis plurajn Idistojn. Louis Couturat mortis en 1914.

Sed oni povas revii kaj imagi, ke, se ne estus tiu skismo, **en unu direkto aŭ en la alia**, t.e. se la Idistoj aŭ la Esperantistoj akceptus resti unuecaj kaj adoptus la alian lingvon, la ideo de neŭtrala helplingvo estus pli sukcesa...

Nuntempe verŝajne estas kelkaj centoj da Idistoj — inter kiuj tre malmultaj la Esperantistoj — kaj malforta movado, kiu videblas i.a. en la reto. Ĝi

En Ido, nomoj ne nepre finiĝas per -o : *Mexiko, Francio, Kanada, Chili*. Por personnomoj, oni simple elektis la Latinajn formojn. *Por la baptonomi on konsilas anke transskribar li segun la formo Latina. To esas l'unika moyeno eskapar divergi sennombra. Cetere quale selektar inter Giovanni, Jean, Johann, Jan, Hans, John, Ivan, e. c.? Ka ni kreos vortaro specala por la baptonomi ? Ne [sic] cherpez de la Latina lia nominativo e dicez : Ioannes, Ioanna ; Iulius, Iulia ; Iakobus ; Andreas ; Lukas ; Antonius, Antonia ; Gabriel, Rafael ; Ludovikus, Petrus, Paulus, Elizabeth, Anna, Sofia, Maria, e. c.*

eble estas dorno en la plando de Esperanto, sed ĝi ne danĝeras...

*Esas notenda, ke la Komitato dil Delegitaro kontenis Esperantisti e mem la Prezidero ipsa di la « Lingva Komitato » esperantista. Or la decido adoptanta Esperanto « kun la rezervo di ula modifiki », esis unanima. Se, pose, skismo eventis, la responso ne esas imputeble a l'Idistaro, ma ad ilti qui obliivis promisi, voti o signaturo.*

## Kebekia literaruro

### *Sylvain Auclair*

Dum Tamara Koziej eklaboris, en Sagano (Kebekio), traduki en Esperanton la teatraĵon *Les Belles-Sœurs*, de Michel Tremblay (kun la permeso de la aŭtoro), mi devas *Lacerte* anonci ke estis tradukita en kotava (legu pri tiu lingvo en [www.esperanto.qc.ca/riverego/LaRiverego100.pdf](http://www.esperanto.qc.ca/riverego/LaRiverego100.pdf)) la romano *Maria Chapelaine*. Libere elŝutebla ĉe [fr.scribd.com/document/386419500/Maria-Chapdelaine-ke-Louis-Hemon](http://fr.scribd.com/document/386419500/Maria-Chapdelaine-ke-Louis-Hemon)

Louis FRÉCHETTE

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado : papere aŭ elektronike!

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis FRÉCHETTE](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. 130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson COBURN](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

« [...] *la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchette idealan donacon – ne nur kristnaskan – al ĉiunivelaj esperantistoj.* » (Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014).

« *Aventuro, pioniroj, neĝostormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama : jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuidaj kaj engaĝaj.* » (Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015).

Kristnaskaj Rakontoj estas ideala kristnaska donaco por viaj amikoj-esperantistoj, aŭ vi mem ! Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon per la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)  
[eo/eldonajhoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)

Papera eldono 23 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj, elektronika eldono 14 CAD.

# Une langue pour les gouverner tous

*Vanessa Destin  (medium.com/tabloid)*

* i-auguste okazis, jam la trian fojon , Paralela Universo : la evento kiu celas kunigi, en unu tago, esperantistojn el diversaj urboj por ekskursi, manĝi kaj pasigi plej agrablan tempon kune. Ankaŭ Montrealo partoprenis (dank' al elstara laboro de Garry Evans), kaj  i-foje e  kun la  eesto de ĵurnalistoj de montreala kultura retrevuo Tabloid.*

** i estas bela lingvo kun belaj vortoj. Kiu portas sian rakonton per siaj akcentoj. Sed kontra e al tio, kion mi sugestas pruntante la vortojn de Yves Duteil,  i tie ne estas demando pri la franca. Esperanto,  u vi scias?**

Vous n'avez rien compris? Normal. Je vous laisse d'abord aller v rifier sur *Google translate*, avant de vous expliquer ce qu'est l'esp ranto.

C'est fait?  
Poursuivons.

Cr e en 1887 par un jeune id aliste polonais, l'esp ranto

est n  d'un d sir d'unir les nations sous la banni re d'une langue commune. Une langue universelle, fabriqu e   partir du croisement de toutes les autres. La « Lingwe Uniwersala », ce projet un peu fou de Ludwik Zamenhof, devait permettre de cr er des ponts entre les peuples

dans une logique d'harmonie et de respect du principe de souverainet  plut t que par des tentatives de domination et d'assimilation. Dans la seconde moiti  du 20e si cle, l'esp ranto a souvent  t  associ ,



à tort ou à raison, aux mouvements de libération des peuples et au militantisme.

Il est très difficile d'estimer le nombre exact de locuteurs d'espéranto. La fourchette incroyable allant 100 000 à 10 millions d'espérantophones s'explique comme suit : selon des recherches menées par un linguiste finlandais, environ 1000 personnes ont l'espéranto comme langue maternelle, 100 000 personnes le parlent couramment et 1 million de personnes auraient tenté de l'apprendre à un moment ou un autre de leur vie, soit par contact avec d'autres locuteurs, soit à travers des cours ou des outils tel que des logiciels.

Malgré un départ en canon en Europe de l'Est et un engouement certain après les deux guerres mondiales (dans la foulée de la création de la Société des Nations puis de l'Organisation des



Nations Unies), l'espéranto n'a jamais réussi à s'imposer dans l'imaginaire au même titre que le latin jadis ou l'anglais maintenant.

Empruntant à l'alphabet romain pour l'écriture et aux langues slaves pour la sonorité, l'espéranto

demeure encore bien vivant. La langue s'enrichit constamment de néologismes qui font apparition dans son dictionnaire pour refléter les nouvelles réalités sociales et technologiques. Et même s'il est peu probable qu'il soit présenté comme langue officielle dans nos institutions internationales ou

encore enseigné dans nos écoles, l'espéranto continue d'attirer des adeptes et sa transmission est plus assurée que celle de certaines langues autochtones.

Les espérantophones d'aujourd'hui apprennent généralement la langue pour le plaisir. On estime

que les locuteurs sont répartis dans près de 120 pays où ils s'organisent en petites communautés pour partager leur passion. L'espéranto c'est aussi des livres, des chansons et des films qui font le bonheur des petits et des grands.

Et une fois par année, les espérantophones se réunissent en congrès international pour tisser des liens de façon à honorer, en quelque sorte, le rêve inachevé de Ludwik Zamenhof.

On a rencontré la branche québécoise dans le cadre d'un événement à Montréal.

<https://medium.com/tabloid/une-langue-pour-les-gouverner-tous-44ce4858305f>



## Verda stelo : jen mistero !

Francisko Lorrain, fidela kontribuanto kaj provleganto por *La Riverego*, tute hazarde, trovis verdan stelon de Esperanto sur trotuaro de Montrealo ! Ĉu vi, hazarde, scias ion pri la domo kaj ĝiaj (verŝajne, antaŭaj) posedantoj ? Ĝi troviĝas ĉe 685, chemin de la Côte-Sainte-Catherine, pli-malpli vidalvide al la preĝejo Saint-Germain. Se vi scias ion pri la mistera stelo, skribu al la redakcio ([riverego@esperanto.qc.ca](mailto:riverego@esperanto.qc.ca)).

Dankon !



# L'espéranto : une langue internationale équitable

La Traduka Oficejo de la Kanada registaro aperigis en novembro 2018 artikolon de la prezidanto de ESK, Nicolas Viau, en sia blogo ! Ni republikigas la tekston. La originalo troviĝas ĉe [www.noslangues-ourlanguages.gc.ca/fr/blogue-blog/esperanto-fra](http://www.noslangues-ourlanguages.gc.ca/fr/blogue-blog/esperanto-fra)

## *Nicolas Viau*

Vous êtes-vous déjà demandé ce qui se produirait si on pouvait communiquer avec des gens de langues maternelles différentes en toute équité, tout en favorisant la diversité linguistique? C'est le but que se donne l'espéranto. Il s'agit d'une langue « construite », c'est-à-dire conçue de manière consciente.

### **Les origines**

L'histoire de l'espéranto commence lorsque Ludvik Lejzer Zamenhof publie les bases de la langue en 1887. Originaire de la ville de Bialystok, dans l'est de la Pologne actuelle (à l'époque dans l'Empire russe), ophtalmologue de profession, il s'était donné pour but de créer une langue permettant à des gens de cultures différentes de communiquer plus facilement et ainsi de dépasser leurs désaccords, influencé notamment par les réalités de sa ville natale, où se côtoyaient sans grande harmonie les communautés juive

(dont Zamenhof lui-même était issu), russe, polonaise, allemande et biélorusse.

### **Une langue accessible à tous**

Le vocabulaire de l'espéranto est essentiellement issu de langues européennes. Toutefois, ce qui rend la langue très accessible, c'est sa grammaire très régulière et essentiellement sans exceptions, qui permet de généraliser chaque concept appris à toute la langue. On peut aussi créer très facilement de nouveaux mots et concepts, ce qui rend la langue très adaptable aux nouvelles réalités. Ces caractéristiques sont aussi de nature à donner aux personnes qui apprennent la langue une plus grande confiance en leurs capacités d'apprentissage.

Voici quelques exemples de création lexicale à l'aide de préfixes et de suffixes fréquents :

varma [chaud, chaude] + -et-

[diminutif] = varmeta [tiède]  
arbo [arbre] + -ar- [dénote un ensemble] = arbaro [forêt]  
bona [bon, bonne] + mal-  
[inverse] = malbona [mauvais, mauvaise]

## Une langue équitable, pont entre les cultures

Franchir la barrière de la langue est un problème aussi vieux que l'humanité. Comme le sait tout apprenant d'une langue seconde, il est plus difficile de s'exprimer clairement dans cette langue que dans sa langue maternelle... D'où l'idée d'une langue de communication auxiliaire facile à apprendre et « neutre », au sens où elle n'est la langue maternelle de (presque) personne et n'appartient donc à personne. (En fait, elle est à tout le monde!)

### Une langue construite devenue vivante

Mais n'est-ce pas une vieille utopie droit venue du 19e siècle? L'espéranto est au contraire une réalité vivante, composée de gens les plus divers, aux quatre coins du globe : familles, musiciens, écrivains, informaticiens, et bien d'autres. L'espéranto est aujourd'hui une langue utilisée en personne autant que sur Internet. Le réseau a d'ailleurs donné à la langue une cure de jouvence.



Gouvernement du Canada / Government of Canada

Rechercher dans Canada.ca

Emplois ▾ Immigration ▾ Voyage ▾ Entreprises ▾ Prestations ▾ Santé ▾ Impôts ▾ Autres services ▾

Accueil → Culture, histoire et sport → Identité canadienne et société → Langues → Ressources du Portail linguistique du Canada → Blogue Nos langues

## L'espéranto : une langue internationale équitable

Par le Bureau de la traduction

Date de publication : 19 novembre 2018  
Rédigé par : Nicolas Viau



Vous êtes-vous déjà demandé ce qui se produirait si on pouvait communiquer avec des gens de langues maternelles différentes en toute équité, tout en favorisant la diversité linguistique? C'est le but que se donne l'espéranto. Il s'agit d'une langue « construite », c'est-à-dire conçue de manière consciente.

Les projets en ligne sont nombreux : voyons par exemple la [version espérantophone de Wikipédia](#).

L'espéranto, ce sont des congrès et des rencontres chaque année, sur tous les continents, un réseau de personnes prêtes à accueillir des voyageurs espérantophones du monde entier (Pasporta Servo)... Il existe aussi de très nombreux livres en espéranto (traductions ou œuvres originales), de la poésie, de la musique.

### L'espéranto et moi

Je m'intéresse depuis longtemps aux langues, et aussi aux rapports de force entre elles. Trouvant le concept de langue neutre intéressant pour rendre la situation plus équitable, et curieux à l'idée d'apprendre une langue construite, j'ai décidé d'en apprendre les bases en 2009. J'ai rapidement atteint un assez bon niveau de



compréhension, mais la vraie « révélation » est venue quand, en 2013, j'ai participé à ma première grande rencontre d'espéranto à l'étranger, en Slovaquie. Là-bas, je me suis amusé et fait de nombreux amis – le tout entièrement en espéranto! À mon retour à Montréal, je me suis impliqué plus intensément dans nos activités locales autour de l'espéranto.

J'apprécie le sentiment de liberté par rapport à ce qu'on pourrait appeler les conventions linguistiques « normales ». L'espéranto est un terrain d'entente linguistique qui permet à chaque personne d'être elle-même dans l'échange, hors des hiérarchies entre les langues et cultures...

### **Un succès improbable**

Pour finir, l'espéranto constitue ce que j'aime appeler une « expérience humaine » : d'abord au sens où l'espéranto est une activité sociale, à travers laquelle on rencontre souvent des gens aux parcours de vie parfois hors du commun.



Ensuite aussi au sens de « quelque chose dont on ne connaît pas le résultat ». L'espéranto, c'est l'expérience unique et à grande échelle d'un réseau de personnes de tous horizons, qui l'ont appris pour s'aider à communiquer, au-delà de la barrière de langue.

### **Montréal au cœur du monde espérantophone en 2020**

Au Canada aussi, l'espéranto est bien en vie! Des rencontres régulières ont lieu dans plusieurs grandes villes, comme Montréal, Toronto, Ottawa ou Québec...

Le Congrès mondial d'espéranto a lieu

chaque année dans une ville et un pays différents. En 2020, pour sa 105e édition, c'est Montréal qui accueillera l'événement (du 1er au 8 août) et qui sera donc, pendant une semaine, le centre du monde espérantophone... Qu'attendez-vous ? Vous avez largement le temps d'apprendre la langue d'ici là ! Au plaisir de vous voir au [Congrès mondial d'espéranto](#) en 2020 !

# Kanada Antologio aperos en 2020

## *Zdravka Metz*

Dum la UK en Koreujo en 2017, la kanadaj esperantistoj eksciis, ke UEA akceptis ilian inviton okazigi la UK-on en Montrealo en 2020.

Tuj estis organizita LKK en Montrealo, kiu komencis renkontiĝi, kunigi informojn, prepari la Unuan Bultenon por disdoni dum la UK en Lisbono ĉi-jare (en 2018). La inform-kiosko pri la montreala UK estis tre sukcesa kaj bone vizitata, kaj mallonga filmo estis projekciita dum la programero Venontaj Kongresoj.

Aparte de tio, formiĝis en Viktorio (Brita Kolumbio) en 2017 grupo de kunlaborantoj, kiu kuniĝis kaj komencis traduki anglalingvan literaturon, cele al la eldonado de la unua kanada antologio en Esperanto.

La Antologia Komitato en Viktorio konsistas el Erik Petersen, Andrew Sly, Wally kaj Olga du Temple, Paul kaj Maria Hopkins, Bob Williamson kaj pasintaj redaktoroj de la revuo *Lumo*, la oficiala organo de Kanada Esperanto-Asocio. La Antologia Komitato pri la francaj verkoj konsistas el Zdravka Metz, Treffleo Mercier, Guy Matte, Prof. Richardson kaj pasintaj redaktoroj de *La Riverego*.

Pere de la lingvoj franca aŭ angla estas tradukotaj ankaŭ legendoj, rakontoj kaj poemoj de indiĝenaj

nacioj, por ke la Kanada Antologio nepre enhavu tradukaĵojn el tiuj kulturoj.

La du teamoj kunlaboras ĉi-maniere :

- ĉiu teamo provas mem akiri, se necesas, de la koncernaj aŭtoroj aŭ eldonejoj la rajton publikigi Esperantan tradukon,
- se temas pri romano, longa rakonto aŭ longa poemo, estos tradukita ĉirkaŭ deko da paĝoj,
- Wally du Temple estas la kunordiganto de la anglalingva teamo kaj informadas pri ĝia progreso la franclingvan grupon.

La Antologio jam komencas fariĝi pli konkreta :

ĝia formato estu 15 cm × 22 cm (simila al la Aŭstralia Antologio), ĝi enhavu inter 400 kaj 450 paĝojn, finelekto de tradukitaj verkoj por la Antologio okazu en januaro 2020, la tekstoj iru al la enpaĝigisto kaj eldonisto komence de februaro 2020, la pretigita teksto iru al la presisto fine de februaro 2020. Estas decidote, ĉu la presado fariĝos en okcidenta Kanado aŭ, alternative, en Montrealo, por ke la presita Antologio estu tuj en la kongresurbo, preta por la UK.



**Dum la biblioteka vespero ĉe Martin Morris ni trovis libron de Julio Baghy kun lia propra subskribo !**



**La ĉarma kompanio por festi Zamenhof-tagon en Montrealo ! Suzano Roy pianludis kaj ĉiuj kunkantis.**

# Esperanto-renkontiĝoj

18 — 20-a de majo 2019 : MeKaRo	Kingstono, Kanado
14 — 17-a de junio : Komuna Landa Kongreso	Bostono, Usono
20 — 27-a de julio 2019 : UK	Lahtio, Finnlando
28-a de julio — 4-a de aŭgusto : IJK	Liptovský Hrádok, Slovakio
12 — 14-a de oktobro 2019 : ARE	Novjorkio, Usono
1 — 8-a de aŭgusto 2020: UK	Montrealo, Kanado

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Ni renkontiĝas la duan kaj la lastan\* vendredon de la monato, vespere, krom dum la somero. La renkontiĝoj okazas en la restoracio Resto Végo (suba saloneto) : [1720 rue Saint-Denis](#), metroo « Berri-UQAM ». Manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Speciale por lernantoj, Suzanne Roy foje okazigas ludecajn paroligajn kursojn, inter la 18:00 kaj la 19:00 en la sama tago, en la kafejo La Récréation, 404 rue Ontario Est. Post la paroliga kurso la grupo pluiras al Resto Végo. Bonvolu kontroli nian horaron ĉe la retejo de ESK : [esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/](http://esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/) aŭ vizitu nian FB-paĝon : [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec). Kontrolu ilin ankaŭ por vidi la datojn de renkontiĝoj en Kebeko !

\* kutime la lasta vendredo estas la kvara vendredo de la monato, sed, se estas kvin vendredoj en la monato, ni renkontiĝas la kvinan vendredon.

## Rencontres d'espéranto à Montréal

Les rencontres ont lieu les deuxième et dernier\* vendredis de chaque mois, sauf pendant la période estivale. Le lieu des rencontres est le Resto Végo (petit salon en bas) : [1720 rue Saint-Denis](#), métro Berri-UQAM. Souper à 18 h, discussions à partir de 19 h 30. Spécialement pour les débutants, Suzanne Roy parfois anime des cours de conversation ludiques, de 18 h à 19 h, le même jour, au café La Récréation, au [404 rue Ontario Est](#). Après le cours de conversation, le groupe rejoint celui du Resto Végo. Veuillez vérifier le calendrier sur le site de la SQE: <http://www.esperanto.qc.ca/fr/calendrier/> ou notre page FB: [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec) (pour Montréal ou Québec).

\* Le plus souvent, le dernier vendredi du mois est le quatrième, mais, s'il y a cinq vendredis dans le mois, la rencontre a bien lieu le cinquième.

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2019.04.20

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

**Visitez notre site web !**

[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.